



## RANO VOLAS EGALI BOVON

Jen apud rano estis bovo,

Al ĝi, altkreska ĝi montriĝas.

La rano tiel granda sume kiel ovo,

Envia, etendiĝas, penas kaj ŝveliĝas

Por esti dika kiel la bestego;

Dirante: « Vidu do, kolego;

Respondu ĉu sufiĉas mia granda tiel? »

« Ne. » - « Tiam mi atingis fine vin? » - « Neniel. »

« Jen fine. » - « Ne alproksimiĝas vi. » Malforta

Ŝveligis ran' ĝis krevo morta.

En mondo, multaj homoj tiel stulte rolas:

Konstrui volus burĝoj kiel grandsinjoroj,

Princetoj agas per ambasadoroj.

Paĝiojn la markizoj volas.

**Libro I,3**



*Jean de La Fontaine*  
8 juillet 1621 – 13 avril 1695

